# TEJO-aktuale: numero 83, 2002-10-17

**Informa Kanalo Abonu.Com**

**EN LA NUMERO:**

- **ESPERANTO.NET: PLI OL 30000 VIZITANTOJ MONATE**
- **INSTRUISTOJ EL AFRIKO**

## ESPERANTO.NET: PLI OL 30000 VIZITANTOJ MONATE

Komence de junio Universala Esperanto-Asocio refunkciigis la retejon http://www.esperanto.net, kiu nun prezentas informojn pri Esperanto en 57 lingvoj (kaj la nombro kreskas). Ankaŭ la kvanto de la vizitantoj kreskas kaj en septembro atingis 32000. Ĉe serĉado de "Esperanto", la plej grandaj serchmaŝinoj (Google, AltaVista, Yahoo!...) montras la retejon kiel unuan.

## INSTRUISTOJ EL AFRIKO

La Afrika Oficejo de Universala Esperanto-Asocio en Lome (Togolando) metas instruistojn je dispono de E-organizaĵoj. Se vi volas organizi kurson kaj bezonas instruiston, sendu peton al afrikaoficejo@hotmail.com.